Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio**

# La Kolombo de Paco

**17-a de julio 2021, numero 7**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova




## La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto estis oficiale malfermita la 17-an de julio 2021!




## La tuta mondo estis prezentita dum la Malfermo



Dum Malfermo de la VK Orlando Raola komunikis, ke VK sekvas la tradicion de UK-oj, kie venas salutoj el diversaj partoj de la mondo, sed kun ioma modernigo. Dum la UK-oj tion faras reprezentantoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis la partoprenantoj. Dum tiu ĉi VK oni decidis, kiel pasintjare, por ne tro longigi la programon de la Malfermo, peti reprezentantojn de diversaj kontinentoj de la mondo, kie oni parolas Esperanton, saluti la Kongreson.

Eblas rimarki, ke por reprezenti la kontinentojn estis elektitaj nur virinoj. Laŭ la opinio de Fernando Maia tio estas granda honoro, kaj oni devas substreki gravecon de virinoj en la Espernto-movado.









Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Vizaĝoj de la Malfermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto




Prezidanto de UEA



Vicprezidanto de UEA



Estrarano de UEA



Kunordiganto de E@I



Vinko Markovo, prezidanto de SAT



Mireille Grosjean, prezidato de ILEI



Charlotte Scherping Larsson, prezidanto de TEJO



Vicprezidanto de Akademio de Esperanto

Pri la prezento de la LKK de la Belfasta UK legu en la sekva numero de *La Kolombo de Paco*



# Asorti koncertis dum la malfermo

Asorti estas familia konata Esperanta muzika ensemblo el Litovio. Ĝi konsistas el la muzikistoj Edvardas (patro), Jelena (patrino) kaj Edgaras (filo) Piščikas. La ensemblo profesie koncertas dum la diversnivelaj Esperanto-renkontiĝoj, i.a. dum IJK, UK, BET kaj multaj aliaj. Krom Esperanto ili kantas en la litova, angla kaj rusa, partoprenante plurajn neesperantistajn muzikfestivalojn. Dum tiuj ĉi aranĝoj ili kantas ankaŭ en Esperanto, disvastigante tiamaniere konojn pri nia lingvo al la ekstera publiko.

Dum la Malfermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto Asorti prezentis profesie filmitan koncerteton, kiu daŭris pli ol 20 minutojn. Oni povas re-spekti ĝin ĉe https://vk.retevent.com.

# Aŭstralia Esperanto-Asocio invitas vin

Aŭstralia Esperanto-Asocio invitas vin la 18-an de julio 2021, je la 16:00 – 18:00 Sidnej-tempe (UTC+10), partopreni vin en la dimanĉa programo:

**AMO: De 2014 ĝis Oceanio + La nov-zelanda odiseo** – Stefan MacGill (Hungario)

La AMO-programo de UEA naskiĝis en marto 2014 per la unua seminario en Hungario. Ĝis la fino de 2014, seminarioj okazis en kvar kontinentoj – mankis nur la kvina. Finfine, komence de 2020, la programo atingis Oceanion per la 62-a seminario en Aŭklando, Nov-Zelando. La sekva seminario estos la 74-a. La dua temo prezentas bildan resumon de la vojaĝado trimonata tra ambaŭ insuloj de Nov-Zelando: Pli ol 1500 km po-insule per aŭto, kiu permesis reviziton al lokoj de mia juneco.



**Magia spektaklo** – Fukuda Toshiro (Japanio).

Fukuda estas senlandlima magiisto. Li jam montris sian mirindan prezentaĵon al infanoj (kaj plenkreskuloj) ĉirkaŭ la mondo. Li vizitis orfejojn, rifuĝejojn kaj lernejojn en multaj landoj, inkluzive de Etiopio, Afganio, Sirio, Irako kaj Tibeto. Dum tiu prezentaĵo, li ankaŭ klarigos kelkajn ideojn pri magio.

Pliaj informoj kaj alirdetaloj:
https://mallonge.net/fk

Aŭstralia Esperanto-Asocio

# Interesa anonco por kvizemuloj pri (pli riĉaj) premioj

Veraj Virtualaj Kvizoj, kiuj okazos trifoje – dimanĉe je la 17:30, lunde je la 17:30 kaj marde je la 17:00 havos pli interesajn premiojn!

Ĉar por la plej perfekta kvizemulo kun plej multaj punktoj dum tri tagoj – estos la membreco en UEA – laŭ kategorio MA-22, tio signifas Membro-Abonanto por la venonta jaro 2022! – kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon *Esperanto* papere.




La 2-a kaj 3-a loko estos honorigitaj per membreco laŭ kategorio MB-22, t.e. Membro Baza por venonta jaro 2022! – kun reta aliro al UEA-servoj: reta versio de la revuo *Esperanto*, Delegita Reto (reta jarlibro).

Ĉu valoras partopreni Virtualajn Kvizojn – mem decidu kaj provu ekzemplajn laŭ la ligilo: https://learningapps.org/view7329573

Memoru nur, ke en provo estas ege facilaj kvizoj – fakte ili estos ne tiom facilaj!

Marian Zdankowski – kreinto de kvizoj petas pri rimarkoj fresxo@gmail.com


# Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo

La IKU-inaŭguro okazis sabate, la 17-an de julio, je la 14-15:30 UTC. La inaŭguron ĉeestis ĉirkaŭ 160 spektantoj. Amri Wandel faris koncizan skizon de la historio de IKU kaj AIS, sekve Michele Gazzola prezentis la IKU-prelgantojn, kaj fine Wandel prezentis la ceteran sciencan programon (Scienca Kafejo) kaj la IKU-libron.

La inaŭguro estas spektebla ĉe https://mallonge.net/fl.

Sekvis lia unua prelego pri nigraj truoj.

En la riĉa **scienca programo** dum la 2-a Virtuala Kongreso vi trovos ok prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato (74-a sesio) el kiuj kvar havos daŭrigan prelegon, eventuale kun AIS-ekzameno. La IKU-prelegoj okazos meze de la kerna programo (inter la 13-16 UTC) konvene por preskaŭ ĉiuj horzonoj, de Japanio ĝis Kalifornio. Krome okazos lunde la kvar prelegoj de la Scienca Kafejo. Ĉiuj tekstos troviĝas en la senpaga reta IKU-libro 2021: http://iku2.trovu.com



**Jen la plena laŭtaga programo (tempoj laŭ UTC):**

Sabato 17 julio: 14:00-15:30 IKU-inaŭguro, Nigraj truoj (Wandel)

Dimanĉo 18 julio: 13-14h Fraktoj (Jacobsen), 14-15h Lunesplorado (Maurelli)

Lundo 19 julio: 12-14h Scienca Kafejo (Brandenburg, Spano, Madella, Striganova)

14-15h Lingva Justeco (Gazzola), 15-16h Komputada kemio (Raola)

Mardo 20 julio 13-14h La Katastrofo kaj ties bardoj (Bronŝtejn)

Ĵaŭdo 22 julio 14-15h Kovim kaj koro (Sayadpour)

Vendredo 23 julio 13-14h Spirmalsanoj (Beecham)

Sabato 24 julio 12-13h Scienca Forumo (resumo kaj disdono de AIS-atestoj)

La resumojn de la IKU- kaj SK-prelegoj eblas vidi en https://uea.org/teko/IKU/2021.




**Vi povas libere elŝuti la IKU-libron ĉe http://iku2.trovu.com**